



**Numero 2024:21; majo 25.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo belga arĥivo 380 KB. Sume 680 KB

## UEA aktivis ĉe UN en Kenjo

Jen raporto de la reprezentantoj de UEA en la Civilsocio Konferenco, kiu okazis en Najrobio, Kenjo, de la 9-a ĝis la 11-a de majo. Organizis la konferencon la Departemento de UN pri Tutmonda Komunikado, prepare al Pintkonferenco de la Estonteco, kiu kunvenos en Novjorko en septembro por ekzameni progreson pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj klopodi renovigi la energion bezonatan por ilin atingi. Niaj reprezentantoj, Mana Brinson (el Kongo DR) kaj Anny Joanice (Burundo), aktive partoprenis la diskutojn, emfazante la lingvan dimension de la kunlaborado necesa por realigi la Celojn, kaj kontaktante aliajn partoprenantojn rilate al Esperanto kaj lingvaj demandoj. **Ni dankas al Mana kaj Anny pro ilia kontribuo.**

Inter la homoj kontaktitaj estis Liberato Bautista, prezidanto de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN (CoNGO). UEA estas membro de la estraro de CoNGO. D-ro Bautista invitis ilin vojaĝi por viziti preĝejaron, kie ili interalie parolis pri Esperanto.

Intertempe, en Novjorko, nia reprezentanto Francis M. Hult partoprenas la pretigon de dokumento de NRO-oj por prezento al la Pintkonferenco de la Estonteco. Kiel ofte okazas, la lingva dimensio en plenumo de la Celoj estas plejparte ne atentata de la gvidantoj de NRO-oj. Francis forte batalas por inkluzivigi en la dokumenton atentigon pri la lingvaj problemoj kiuj nun malhelpas la kunlaboron necesan por realigi la Celojn.

*Laŭ teksto de Humphrey Tonkin*

## Sukcese okazis la Eŭropa Kongreso

Tiu kongreso arigis sescenton da aliĝintoj kaj ĝuis partoprenon de esperantistoj el multaj eŭropaj landoj, inkluzive de kelkaj homoj el la centra kaj orienta Eŭropo. Laŭdinde, ili eldonis flugfolion en la franca kun la programo de la kongreso, por ke la publiko sciu pri la kongreso. Jen koncizigo de la alparolo de Bea Bieber al la Kongreso.

-----

Karaj partoprenantoj de la Eŭropa Esperanto-Kongreso!

Vi renkontiĝas sur speciala grundo.. en la trilanda regiono. Tiu etendiĝas en Francio, Germanio kaj Svislando.[...] Eĉ se ni konsistigas bone strukturitan regionon, ni konstatas, ke la uzo de du lingvoj barojn metas. Ni bone traktas tiun problemon, sed foje ni deziras, ke ĉiuj parolu Esperanton. Nun tiu lingva obstaklo estas unu el miaj

prioritatoj en mia prezida jaro. Ni kunlaboras kun la bazela universitato kaj la Scienca Altlernejo de Okcidenta Svislando, kiu kreas ludon por la lernejo de la regiono por stimuli la komprenemon inter aliuloj.

Eble ni devus enfokusigi nian atenton al Esperanto, ne nur vi, kiuj havas ĝin kiel vivo-celon, sed ankaŭ politikistoj en ĉiuj regionoj, kiuj konas lingvajn barojn. Se en viaj diskutoj, vi havas elstarajn ideojn, bonvolu komuniki ilin al mi. Mi volonte transdonos ilin al mia Konsilio. Mi deziras al vi inspiran kaj sukcesan tempon. Vi akiru novajn sciojn kaj kontaktojn, kiuj spronos vian pasion por tio, kio ligas nin.

[La tekston kaj aliajn materialojn reportis al Hungario Perlo Miela](#)

## Nova Esperanto-Arkivejo en Belgio

Raportas la Internacia Esperanto-Arĥivo (IEspA). Ilia arkivo komence transprenis du grandajn privatajn kolektojn. Aldoniĝas daŭre libroj, revuoj, dosieroj, objektoj en kaj rilate al Esperanto. Ankaŭ vi povas transdoni viajn arkivajn dokumentojn rilate al Esperanto jam nun... aŭ en estonta iamo kiam vi ne plu bezonos ilin mem. IEspA konservas kaj disponigos ilin al esplorantoj. Ĝis nun la arkivo troviĝas en granda privata loko. Tio baldaŭ ŝanĝiĝos. IEspA sukcesis aĉeti grandan arkivejon en la centro de la urbo Diest en Belgio. La spaco sufiĉas por la nuna kolekto kaj ĝia pli ol duoblo. Luigado de aldona apartamento kovros la kurantajn kostojn de la arkivo.

**SMG:** Ni alkroĉas raporton pri la atingo, kune kun fotoj de la arkivejo (380 KB).

## Brazila muziko en superabundo

Jen la aktuala listo de la premieraj videoj disponeblaj en **BrazilMuzika Klubo**:

- **Antoniko** (Antonico) - Ismael Silva - Trad: Vitor Mendes
- **Bandita ploro** (Choro bandido) - Edu Lobo k Chico Buarque - Trad: Flávio Fonseca
- **Ja ŝi kariokas** (Ela é carioca) - Tom Jobim k Vinicius de Moraes - Trad: Flávio Fonseca
- **Mateniĝa kanto** (Canção do amanhecer) - Edu Lobo k Vinicius de Moraes - Trad: Fonseca
- **Ne, ne** (Nunca) - Lupicínio Rodrigues - Trad: Flávio Fonseca
- **Ne plu saŭdado** (Chega de saudade) - Tom Jobim k Vinicius de Moraes - Trad: Flávio Fonseca
- **Nu ja (la vivo ĉiam pravas)** (Sei lá (A vida tem sempre razão)) - Toquinho k Vinicius de Moraes - Trad: James Rezende Piton
- **Peĉjo** (Pedrinho) - Dori Caymmi k Paulo César Pinheiro - Trad: James Rezende Piton
- **Por ne diri ke mi ne parolis pri floroj** (Pra não dizer que não falei das flores) - Geraldo Vandré - Trad: Leopoldo Knoedt
- **Sen kompromiso** (Sem compromisso) - Geraldo Pereira k Nelson Trigueiro - Trad: Fonseca
- **Senkolorportreto** (Retrato em branco e preto) - Tom Jobim k Chico Buarque - Trad: Fonseca
- **La viv' pravas ĉiam** (Sei lá... a vida tem sempre razão) Toquinho k Vinicius de Moraes - Trad: Fonseca

Se vi ankoraŭ ne abonas **BrazilMuzikan Klubon**, bonvolu fari tion per la paĝo

[www.brazilakolekto.com/brazilmuzikaklubo](http://www.brazilakolekto.com/brazilmuzikaklubo).

## Nova revuo el Irano

**Provezemplero de Kalejdoskop** estas publike havebla ĉe la retlisto *landa agado* ĉe <https://groups.io/g/esperanto-landa-agado/message/1767>

18 paĝoj, A4, kolora, abonkotizo: 5 eŭroj sendendaj al la indikita adreso.

## Vortaro hungara - esperanta - albana

Kompilita de Szabadi Tibor J.

Ĉi tiu laboraĵo: hungara – Esperanto – albana ĝisfunde ekzamenas diversajn vortojn kaj esprimojn. La scienco havas eksterordinaran teritorion, kiu volas ampleksadi la tutajn. El la scienca studlaboraĵo nur etan parton oni kapablas klarigi, sed per tio estiĝos kompleta mem la scienco. La temo de ĉi tiu verko estas stranga, nur malmultaj scienculoj kaj interesatoj estas kapablaj kun ĝi sperte identiĝi.



La ĉefmerito de tiu laboraĵo estas, ke ĝia verkinto vokas la atenton de la leganto. Esperanto bezonas ĉiam pli novan konfirmon, malgraŭ ke neniu pridubas ĝian ekzistorajton. En la enkonduka parto de la verko estas prezentita iom Albanio, la albana lingvo kaj ĝia gramatiko. Szabadi konfirmas per taŭgaj ekzemploj la teoriajn pritraktojn. Li ankaŭ turnas atenton al la landaj dialektoj. Gratulinde, ke li faris sistemon pri la mallongigoj ĉe la vortoj. La vortokolekta parto de la vortaro konstruas logikan kompletan. Sekvas la indiko de la temoj. Estas bone ordigita la vortokolekto de hungara – Esperanta – albana. Estas la sistemiga elemento la ordo de la literoj. Oni povus diskuti pri la enhav-signifoj, pri la elektado de la vortoj, sed tiu bone spegulas historion, tradiciojn de iu popolo. Estas laŭdinda la studlaboraĵo de Szabadi, kiu kontribuas al la kompleteco de la sciencoj.

Esperantigis: Szabadi Tibor J), Nagykanizsa, 2008.  
dr. Horváth György, hungarlingva revizianto

## Uzindaj kaj uzendaj afiŝoj por la Esperanto-Tago

Tiu grava tago okazos en la 26-a de julio. UEA pretigis afiŝojn en 34 lingvoj.

Rigardu ĉi tien: <https://esperantoporun.org/eo/esperanto-tago-2024/>

La multlingveco de la tradukitaj afiŝoj estas mirinda kaj laŭdinda:

Albana, Angla, Araba, Bosnia-Hercegovina, Ĉeĥa, Ĉina, Dana, Eŭska, Eŭska, Finna, Franca, Germana, Greka, Hispana, Hungara, Irlanda, Itala, Kroata, Litova, Mongola (per du alfabetoj), Nederlanda, Norvega, Persa, Pola, Portugala, Rumana, Rusa, Serba, Slovaka, Sŭahila, Sveda, Ukraina kaj Urdua.

Rafael Lima, kunlaboranto de la oficejo de UEA en Novjorko estas tre lerta, sed nun necesas uzi la afiŝojn!

Renato Corsetti kaj SMG



## Esperantistoj inter lingvistoj en Pollando

Mi ĝoje anoncas ke la **interlingvistika laborsekcio** de la **21-a Internacia Kongreso de Lingvistoj**, kiu okazos ĉi-jare en Poznano, organizita de AMU, havos 12 akceptitajn prelegantojn: Vera Barandovská-Frank, Sabine Fiedler, Jorge Antonio Leoni de León, Natalia Dankova, Christopher Gledhill, Philippe Planchon, Nicolau Dols, Fabio Fortes, Marc van Oostendorp, Basak Aray, François Lo Jacomo kaj Ilona

Koutny. Se ankaŭ distanca prelego estos permesita, tiam ankaŭ Michele Gazzola kies propono same estis akceptita.

Rimarko.: En 1931 okazis la 2-a Internacia Kongreso de Lingvistoj en Ĝenevo, kiam interlingvistikon kiel "novan sciencon" sankciis la dana lingvisto [Otto Jespersen](#). [Ilona Koutny](#)

## Universitate bonstate

La universitata kunveno de la 6-a de majo 2024 aŭskultis raportojn kaj diskutis pri la kurso pri Esperanto ĉe profesoroj de la universitato en Seviljo, Hispanio. Temis ankaŭ pri utiligo de la kursoj pri Esperanto UNED, la hispana malĉeesta universitato, okaze de la venonta Esperanto-Kongreso en Valencio, kiel ĉefa elemento de la informa kampanjo. Oni parolis pri la stato de la Eo-kursoj en la pekina universitato. Philippe Planchon raportis pri *la colloque international sur les langues construites, i-conlang*, komence de julio kaj pri prelego de Federico Gobbo pri interlingvistiko. Venis mencio pri la lastaj eventoj en iranaj universitatoj kaj pri la bonaj rilatoj kun la universitato en Teherano, kie daŭre okazas kursoj kaj okazis la irana Eo-kongreso.

## De AlfaBETo ĝis la nuna BETo

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis aktualigita versio de la artikolo de Povilas Jegorovas pri la historio de Baltiaj Esperanto-Tendaroj (BET), kiun garnas grafikaĵo kaj tabelo kun indikoj pri la jaro, loko kaj nombro da partoprenantoj de ĉiu BET ekde la unua, okazinta en la 1959-a jaro. Legu la artikolon ĉe <https://sezonoj.ru/2024/05/bet-11/>

===== vortoj: 1435 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigok, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.